

STILFIGUROJ en “FESTENO” de Raymond Schwartz (1926)

(perdiĝis la raporteto verkita tuj post la prezento, do jen proksimuma ripeto, tamen kun la originala teksto, kiun mi nur parte memoris.)

Enkonduke:

Ĉar Esperanto, plejokaze lernata ekster familia tradicio, celas servi komune al la tre diverslingvaj mondanoj, pli ol naciaj lingvoj ĝi bezonas firman fundamenton kaj unuecan uzadon. Helpas normverkoj (Fundamento de Esperanto, 9 Oficialaj Aldonoj al Universala Vortaro, Plena Analiza Gramatiko, Pomego, Plena Ilustrita Vortaro), sed fortimigas la amaso da vortradikoj. Tion solvas oftecolistoj, interalie en la 'Zagreba Metodo' kun la ĉ. 450 plej oftaj elementoj de konversacioj, kaj "Aktoj II" (1968-1974) de la Akademio de Esperanto, kiu enhavas 9 oftecogrupojn. El la praktiko oni konstatis, ke por interkompreniĝo pli gravas vortoj ol gramatika ĝusteco. Sed tio validas por la komenca stadio.

Tamen, se ni uzas nur tiun bazan materialon, baldaŭ niaj aŭskultantoj ekdormos pro teda ripetado. Dekomence oni do provis vigligi la lingvouzadon. La fama romia profesoro pri retoriko kaj literaturo Kvintiliano (ĉ.35-c.100 p.K.) asertis ke kion ajn ni diras, tio jam estas figuro. Figurojn PIV disdividas en multajn grupojn, inter kiuj ĝi apartigas 7 stilfigurojn. Sed Till Dahlenburg en sia 'Figuroj retorikaj en beletro esperanta' (2013) pli kutime nomas ĉiujn ĉ. 200 stilaĵojn stilfiguroj. Kaj tio respondas al internacia uzo de la termino. Ordinaran esprimon eblas variigi per aldono, forpreno, anstataŭigo, transloko aŭ ripeto. Jam ĉi-lastata ampleksas 50-on da varioj ĉe Dahlenburg kaj nur fakulo povus enkapigi ĉiujn. Nederlanda samtempaĵo ("Granda retorika vortaro, Leksikono de stilfiguroj" aldonas plian centon, ankaŭ el reklamtekstoj, celante averti la publikon kontraŭ ruzaj komercistoj kaj politikistoj.)

La plano estis ilustrati kelkajn per tekstoj el la Slovaka literaturo, sed eblis prepari nur komenton pri fama poemo de Raymond Schwartz: "Festeno" el 'Verdkata Testamento' (1926).

Troviĝas en la verko kelkdek stilfiguroj, el kiuj la "anominacio" funkcias kiel ekzemplo en la verko de Dahlenburg. Sed jen la listo (eble vi trovos pliajn!):

Adinato – maleblaĵo: en la trijaŭda semajno (kp enantiozo)

Aliteracio – samaj komencliteroj: Sub la sankta ŝigno de l' espero

Aluzio – aludo al tradicio: Patrino tuŝis la giganto Kaj kreskis al li fortoj novaj (Antaĵo kaj Gea)

Ambigueco – dusenca vorto: sen-tema/sent-ema parolado, kp kalemburo, krazo,

Amfigurio – sensenca babilado

Anadiplozo – vortripeto tuj en sekva verso: estis ĝi omaro. Omaro netranĉita

Anaforo – sama komencvorto: Lando de libereco! Lando de Estonteco!...

Anominacio – amuza vortkripligo: glasbatalo

Antifrazo – ironia mal-esprimo: Hm, bela vetero! (dum pluvaĉas)

Antitezo – kontrasto: Feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue.

Antropomorfismo – personigo: La naturo silentis.

Apostrofo – forturniĝo al neĉeestanto: Ho cindroj de mia plej bona amiko!

Arkaismo – ne plu uzata esprimo: Ĥinujo

Brakilogio – tre mallonga esprimo: Ĉiu ĉiun.

Ĉirkaŭfrazo – plurvorta indiko: La urbo de la centa UK. (perifrazo de Lillo)

Derivacio – diversformaj vortoj el la sama radiko: nigre nigra (kp. konversio)

Emfazo – fortigo de unu aspekto: arda diskuto

Enantiozo/oksimoro – kontrasta kombino: glora malvenko

Epanalepso – aliloka ripeto: pacaj batalantoj... en laboro paca

Epanortozo – memkorekto: Mi esperas – kion mi diras? – mi estas certa, ke vi min rekomencos.

Eŭfemismo – evito de ĉagrena esprimo: Li forpasis. (mortis)

Gradacio – vortovico kun kreskanta intenseco: Mi pensis, meditis, cerbumis, rompimis al mi la kapon.

Groteskaĵo – ridinda troigo: Or-kadra pentraĵo de la novaj vestoj de la reĝo. (nevideblaj)

Hendiadino – disdivido de kunaĵo: En pokaloj kaj oro = orpokaloj
 Hiperbato – inversio/ ŝanĝo de vortordo: Grandan vi havos estontecon.
 Hiperbolo – troigo: morte ebria (kp litoto)
 Homearkto – similkomencaj vortoj: komenco kompata-komforta (kp aliteracio)
 Ironio: moka uzo de malvorto: bela vetero (dum pluvaĉas)
 Kalemburo – ambigua konsisto de vorto: ĉastemo: ĉas-temo/ĉast-emo
 Kataforo – referenco/anticipo al substantivo per pronomo: La venko – baldaŭ ĝi venos.
 Keningo – sekreta esprimo: arkanajaĵo por incitoj: Nia hungara ĉefpoeto (Kalocsay) (kp. aluzio)
 Klimakso – la kulmino de gradacio: ... rompis al mi la kapon.
 Konversio – sama vorto diversforme: plene plenumi (kp derivacio)
 Krazo – kunmikso: la armeo – larmejo (kp kalemburo)
 Litoto – maltroigo: ne malbona laboro!
 Metaforo – anstataŭigo per komparaĵo: la 'ŝipo' de la dezerto (kamelo)
 Metonimio – anstataŭigo per pens-asociaĵo: verŝi al iu la morton (venenon: efiko anstataŭ kaŭzo)
 Oksimoro – enantioza frazo: Lia silento estas elokventa
 Paratakso – samranga frazo anstataŭ subpropozicio: Aŭdu: Kio okazis?
 Perifrazo – ĉirkaŭfrazo
 Peripetio – abrupta situaciŝanĝo: Subite Uliso akceptis redonon de Helena.
 Pleonasmio – superflua aldono: kolora ĉielarko
 Prozopopeo – personigo: La arboj kapneis. Kp antropomorfismo.
 Satiro – moka kritiko: Dimanĉe riĉa regalo... sabate sup' sen salo.
 Similaĵo – komparaĵo frape simila: bonvena kiel unua pluvo post seka sezono.
 Sinatroismo – kunigo de vortoj el sama signifokampo: pajlo, fojno, herboj, kanoj, junkoj
 Sinekdoko – parto anst. tuto aŭ male: Ni vidis 30 velojn (ŝipojn)
 Sinonimeco – samsignifa esprimo: memoru, ne forgesu.

FESTENO

1 Kunsidis por festeno, preteĝaj al atakoj,
 2 Dum ĝua koncentriĝo almenaŭ cent stomakoj.
 3 Kaj akra saŭcodoro simile al incito
 4 Kreskigis la mezuron de sana apetito.

5 Jam kuŝis sur la tablo – pli ĝuste sur l' altaro -
 6 La oferota besto, kaj estis ĝi omaro.
 7 Omaro ne tranĉita, en sia tuta formo,
 8 Aspektis ŝafe milda kaj en profunda dormo.
 9 Videble pri marbordoj ĝi songis sensuspekte,
 10 Sed unu festenano sin levis kaj afekte
 11 Kun larma emocio li diris al najbaro:
 12 ”Ĝi ne efektiviĝos, la songo de l' omaro!”

13 Kaj en regula takto dufoje cent makzeloj
 14 Movigis dum maĉado samtiom da oreloj.
 15 Dank' al kaprica vino ruĝiĝis palaj vangoj
 16 Kaj babileme tiam sin movis ĉiuj langoj;
 17 Pri arto, pri scienco kaj nun pri politiko
 18 sagace sin ekzercis diskuto kaj kritiko.
 19 Sed ŝvebis harmonio eĉ super tikla temo,
 20 Ĉar ĉiuj sin distingis per vera... teleremo!!

21 Fervora komunisto predikis elokvente

22 Pri nova ŝtatsistemo kaj montris argumente
23 Disigajn diferencojn de diversrangaj klasoj...
24 Dum fajro de l' diskuto li el najbaraj glasoj
25 Trinketis senatente, – sed tiu ĉi detalo
26 Klarigas l' originon de ĉiu... glasbatalo!

27 Subite tra la pordo (ĝi estis nefermita)
28 Eniris grava viro kaj venis seninvita.
29 Ni scias laŭ proverbo, ĉu ne, ke "la petito
30 Dummanĝe venas", tamen jen venis nepetito!
31 Kaj tiu grava viro, suĉinte kokan oston,
32 Pri sia personeco komencis longan toston.
33 La mutaj samtabloj konjektis kun angoro:
34 "Ho Dio, kiom... tostas ĉi tiu oratoro!?" –
35 De Ventra Komitato leteron li laŭtlegis
36 Laŭ ĝi oficiale lin mem oni delegis,
37 Por ke oficiale ĉeestu li festenon
38 Al ĉiuj alportante oficialan benon.
39 Ĝistede li insistis per tiu ĉi formulo:
40 "Resume mi do estas la Oficialulo!"

41 En tiu ĉi momento veplenda ĝemsopiro
42 haltigis la torenton de nia verva viro,
43 Kaj baldaŭ multobliĝis la krioj kaj la ploroj,
44 Kaj multaj festenanoj tordiĝis pro doloroj,
45 Frotante ŝvelan ventron, kaj tiel, per mimiko,
46 La suferantoj plendis sendube pri koliko!
47 Jam kelkaj naivuloj kun tima superstiĉo
48 Akuzis l' oratoron pru tiu malfeliĉo.
49 Sed iu, almontrante al jam malplena poto,
50 Ekkriis: "Ne! – Ni estas viktimoj de kompoto!!"

51 Kaj nun sin manifestis fatalo senkompata.
52 (Prefere mi silentus pri punkto delikata!)
53 Sed malgraŭ diskretemo de ĉasta embaraso
54 Aŭdiĝis bru' simila al eksplodanta gaso.
55 Kaj sub venĝema premo perfida de skrupulo
56 Honteme ekruĝiĝis... la Oficialulo!...

57 Saĝulo tuj konkludis, facile, sen enketo:
58 "La Oficiala... Gaseto!!"

Komento:

1) kunsidis: arkaismo, sen la kutima senco de PIV. Laŭ la rekomendo de Horacio en la Poezia Arto ni novigu rutinan esprimon per refreŝiga kunteksto.

Pretegej: hiperbolo.

Atakoj: metaforo por rapida etendo de la mano al la manĝaĵoj.

2) ĝua koncentriĝo: iom enantioza, ĉar ĝuo ne implicas penon.

Kunsidis stomakoj: sinekdoko.

3) incito: neintenca arkaismo por ekscito, stimulo. Ne temas pri koleretigo. 'Plena vortaro' (1935) ankoraŭ akceptas la duan signifon.

4) kreskigis la mezuron de: ĉirkaŭfrazo de 'grandigis la apetiton': ŝerca aludo al la elasteco de

dietpreskriboj.

5) sur l' altaro: metaforo kun 'oferota besto' kaj eble 'safe' (milda).

6) kaj estis ĝi: eble ni paŭzu deklamante: inversio/hiperbato por reliefigi la timigan beston, maran kankron kun grandegaj pinĉiloj.

7) kaj 8) 'en sia tuta formo' estas sinonima esprimo de 'netranĉita'.

8) safe milda: similaĵo

9) ĝi sonĝis pri plaĝoplezuroj: antropomorfismo.

Sensuspekte: resendas al 'oferota'.

10) afekte: teatre, melodrame, bombaste: groteskaĵo

12) Ĝi ne efektiviĝis: aluzio al la fino de nia himno "La Espero", sed kun anominacio: "la sonĝo de l' omaro", samtempe satiro pri la franca prononco de 'homaro'. (kp 58)

ĝi – la sonĝo: kataforo.

13) Denova groteskaĵo per la precizaj nombroj, alude al la cent stomakoj (2) kaj la orelmovoj kiel de remaĉantaj ŝafoj.

14) Movigis por ni estas arkaismo, sed en 1926 oni interpretis: igis moviĝi.

15) Dank' al: ironia uzo laŭvorta (kiel 'kunsidis': 1).

ruĝiĝis palaj vangoj: antitezo.

kaprica vino: antropomorfismo.

16) tiam: ne nepre ŝtopaĵo por la ritmo: preludo al atentindaĵo (tikla temo), prepare al 'nun' (17).
moviĝis: konversio post 'movigis' (14)

17) Pri.. pri.. pri: anaforo; arto, scienco, politiko: gradacio, kun la danĝera temo politiko, enkondukita per 'nun' kiel klimakso.

18) sagace: post 'babileme' klare ironio. Sin ekzercis diskuto kaj kritiko: ago anstataŭ aganto: metonimio.

Poste 'diskuto' de komunisto donas problemojn, kaj ĉi-verse aldoniĝas kriz-anonca 'kritiko', sed sekvas antiklimakso (malklimakso) en 19:

Zamenhofa 'harmonio' (ni eble memoru la aluzion en 12) regis super

tikla temo: aliteracio

ĉiuj sin distingis: tio estas adinato, ĉar egala rezulto ne gajnis premion, kvankam toleremo ja laŭdindas.

La ŝvarcaĵo 'teleremo' do nomiĝas nominacio. Sed sekvos eĉ pli bela ekzemplero.

21 komunisto 'predikis': enantiozo.

22 nova ŝtatsistemo: keningo aŭ almenaŭ aluzio: socialismo en tiuj jaroj estis pozitive juĝata.

Tamen poste ni vidos (supozan) aludon al komika preseraro el komunista dokumento.

23 disigajn diferencojn de diversrangaj klasoj: ne nur aliteracio, sed homearkto.

25 detalo: tio povus esti litoto, bagateligo. Tamen eblas pensi pri la zamenhofa "De malgranda kandelo forbrulis granda kastelo".

26 'glasbatalo' eniris nian kulturan trezoron: anominacio. Ĉu klasbatalo ne senĉese necesas? Sed ja eblas ŝerci eĉ pri tio.

27 Subite: peripetio do. Simile en 41, 47 kaj 51.

28 grava viro venis seninvita: aliteracio

29 ĉu ne? apostrofo

la petito: aluzio al la Zamenhofa Dum la manĝado venas apetito. Iom lude-nepedanta cito, do parafrazo (ne en Dahlenburg, ja en la nederlanda leksikono). Krazo liveras 'lapetito' kaj kalemburo 'la petito'.

Por ironie moki la blufulon nia aŭtoro regas lin per banala ne-rimo: la petito – ne petito. Cetere li modele rimas.

31 Grava viro: ripeto de 28: epanalepso.

32 Pri sia personeco ... toston: socia maleblaĵo: En ĉetabla parolado oni ĉiam omaĝas al venkinto, festanto aŭ la gastgiganto. Adinato aŭ oksimoro.

33 mutaj: brakilogio por 'perplekse mutigitaj', ĉar temas pri drink-babilemuloj (16).

34 kiom tostos: surduloj legas en tio parodion aŭ eĉ satiron pro nedistingeblo inter k kaj t. Eble

aludo al tia miskompreno famiĝinta.

35 Ventra Komitato: supoze aludo al oficiala dokumento de CKKPSU, Centra Komitato de Kompartio de Sovet-Unio. Misklavado de apudaj literoj (c v) facile povis kulpi pri rideksplodoj. Ĉu komunisto eble parazitis?

leteron li laŭtleĝis. Laŭ ĝi: longa aliteracio: ĉu kun ebria lo?

36-40 Banala ripetado, kvalifikita per 'ĝistede': amfigurio.

Oficiale, -an, -ulo: konversio. Kaj Oficialulo elstaras signife versfine.

41 En tiu ĉi momento: nova peripetio.

Ve-plenda ĝem-sopiro: sinatroismo. Sopiro por ni iĝis arkaismo = suspiro.

42 Torento, t.e. rapida parolfluado: metaforo.

Verva viro: aliteracio kaj rememorigo pri la fervora komunisto.

47 Jam kelkaj naivuloj: ni sentas la streĉon, anoncon de danĝero, kiel ĉe la 'tikla temo'.

Tima superstiĉo: pleonasmo, tamen signifa por lanĉi la psikologian konsciigon, ke klaĉojn inspiras timo.

Viktimojn de kompoto: la tuto efikas kiel anominacio. Eblas kompari la pluskonsonantan rimon: penetro – fenestro. (Inverse mi dirus 'minuskonsonanta' rimo.) Komplotpensado restas aktuala.

51 sin manifestis: antropomorfismo

fatalo senkompata: pleonasmo

delikata diskretemo ĉasta embaraso skrupulo: sinatroismo.

Bru' simila al eksplodanta gaso: ĉirkaŭfrazo de 'furzo', sed precipe 'eŭfemismo'.

56 la Oficialulo: samloke kiel en 40, tamen alinuance: diaforo.

58 La aplomba finakordo (aluzio, keningo por multaj) rilatas la Oficialan Gazeton Esperantistan, kiun Hippolŭte Sebert eldonis de 1908 ĝis 1922. En 1926 oni bone memoris ĝin! Kaj 'gaseto' estas post 'eksploanta gaso' litoto, sed samtempe satiro pri la nederlanda pronoco de gazeto, kompanse kontraŭ la franca pronoco de 'homaro'.

Rob Moerbeek.